

& Promesoj:

< Rekante 28 el 61 battoj por strofo, entute 976 paŝoj dum 11 minutoj. Verkis kaj komponis Mikaelo Bronŝtein. Klarigoj (*): '4 Korno: metaforo pri kokrato.>

(#Melodio:

< 1,5:61> (hLa /Lado miLa h hLa /Lado miLa h; lala lala /so so so ofa /mimi h h; mi fami /reLa h hlala lala /miLa h h; mimimi /mimi i imi fisi /lala a

(#Rekantaje: /re ere fafa fare /fa; lala fa re; /re ere fafa fala /so o o h; /so oso soso sofa /mi so la; h /mimi sisi sisi la /h h) ×5)+

(&Strofoj:

,& Historia antaŭparolo:

'1 En /mezopoko kruc/kavaliro ; Rapidis /al milita /iro. ; Kiraso /peza – pli ol granda /ŝtono, ; Kaj por l' ed/zino – kirasa /zono.

(×: /Ĉar validas la pro/mes' – ; Unu, du, tri – ; /Post tri jaroj da for/ges'. ; /Pasos baldaŭ la tri /jaroj, kaj ; /Ĉiuj dancos ni kun gaj'/.)

'2 Nobele palis vizaĝ' diskreta, ; Ŝlosilo falis al la poŝ' sekreta. ; Kaj la edzinon li nur benis, pia ; – Fidela estu je nomo mia.

'3 L' edzin' ploretis, naktukon prenis. ; Femurojn belajn kiraso premis. ; Kaj tutsincere promesis la edzin': ; – Sinjoro mia, mi fere amos vin.

'4 Forĝisto juna – servuto bela ; – Ŝlosilon fari? Fu! bagatelo... ; Kruckavaliro sub pluva ŝpruco ; Jam portas kornojn* anstataŭ kruco.

'5 Ĉar la promeso – la edza mendo ; Validas post tri jaroj da atendo. ; Ne ploru edzo! La temp' degelos. ; Tri jaroj pasos. Eble ŝi fidelos.

(×: Ĉar validas la promes' – ; Unu, du, tri – ; Post tri jaroj da forges'. ; Pasos la tri jaroj, kaj kun rid'. ; Fidelos ŝi al la kokrit'.)

,& Parto unua de la promesoj:

'6 En historio – alia paĝo ; Fondiĝis nia organizaĵo. ; Dum tiu fondo mi mem aplaudis, ; Kaj la promesojn unuajn aŭdis.

(×: Ĉar validas la promes' – ; Unu, du, tri – ; Post tri jaroj da forges'. ; Pasos baldaŭ la tri jaroj, kaj ; Ĉiuj dancos ni kun gaj'.)

'7 Donante ĵuron promesis oni ; Literaturon por ni eldoni. ; Nur lernolibrojn, ne poezion... ; Ĝis nun ni reve atendas tion.

'8 Pugnante bruston, promesis fere, ; Ke ni vojaĝos – jes – ne nur letere. ; Al eksterlando oni grupojn sendos... ; Ni ankaŭ tion ĝis nun atendas.

'9 Kaj sekvis pluraj promesoj belaj ; Pri foraj taskoj kaj proksimaj celoj, ; Pri la revuo kaj pri la regularo. ; En revoj pasis la unua jaro.

'10 Sed pluraj uloj komencis knari: ; – Vi ne promesu, se ne povas fari. ; Dum la tendaro popol' pasia ; Proponojn verkis por la Asocio.

'11 Promesis oni: – Ni eklaboros, ; Proponojn viajn ni tuj-tuj esploros. ; Elektos homojn – la plej akuratajn, ; Preparos planon kaj fiksos datojn.

'12 La libroj venos al vi libere, ; Tendaroj plenos ĉiusomere. ; Kontentos tute vi pri abono. ; Kaj eĉ vojaĝos, se estos mono.

'13 Promesis oni, promesis oni, ; Laciĝis langoj la promesojn doni. ; Sed taskojn oni nun havas ŝvite – ; Transmeti datojn mem alfiksitaĵojn.

'14 En revoj pasis ankaŭ dua jaro. ; Promesoj multas, eĉ ne unu faro. ; Nu kial vane vi malpacienas? – ; Tri jaroj pasos – oni komencos.

,& Finvortoj:

'15 Nu jen, amikoj, mi mem forgesis, ; Ke ŝajne kanton al vi promesis. ; Babilis multe. Gitaron plukis. ; Vi opinias – mi ekkadukis?

'16 Sed miaj karaj, ne gratu dente, ; Kaj ne rigardu min elokvente... ; Ĉu la afero ne estas klara? – ; La kant' aperos ... en la okdek kvara.)